# LA INFORMILO

***


informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

ELDONISTO: ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

EDITEUR: Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture
27, rue de la République, 54000 - NANCY - Fr.
PĈK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série
trimestriel
2° TRIMESTRE 1977
n° 18



abonnement
un an: 10 F
UNU JARO: 10 F
(8 INTERN. KUPON.)

NTO★FLASH.... ESPERANTO★FLASH.... ESPERANTO★FL

## l'espéranto, langue no 1 des vacances !

### EN HOLLANDE ★

Du 9 au 16 juillet, le club Esperanto de OLDENZIJL organise une semaine internationale de travail au cours de laquelle une propriété rurale sera remise en état.

### AU BRESIL ★

Du 14 au 17 juillet, dans le cadre du séminaire d'Espéranto de SANTOS se déroulera la "première fête musicale espérantiste" avec remise de coupes aux trois premiers auteurs de morceaux primés.

### EN YOUGOSLAVIE ★

Du 1er au 31 août les participants espérantophones de la "brigade internationale de travail" se retrouveront à SARAJEVO. En dehors des activités manuelles des matinées, alterneront visites guidées d'entreprises, excursions, soirées culturelles et folkloriques.

### EN ALLEMAGNE ★

Un groupe de jeunes Israéliens séjournera en RFA avant de participer au Congrès Mondial de la Jeunesse Espérantiste de POITIERS. Il convient de noter que ce voyage bénéficie de subventions officielles des deux gouvernements respectifs.

LA SUISSE ACCUEILLERA POUR LA 5ème FOIS LE CONGRES UNIVERSEL

Après Reykjavik en août prochain et VARNA (Bulgarie) en 1978 la ville de Lucerne sera le rendez-vous des espérantophones du monde entier, du 28 juillet au 4 aout 1979. On prête l'intention à la Fédération Hélvétique d'éditer à cette occasion un timbre commémoratif.

Rappelons que le Docteur ZAMENHOF lui-même a participé à deux Congrès Universels dans ce pays.

*L'ESPERANTO AU CONGRES DES EDUCATEURS DE L'ECOLE MODERNE*

*Près de 700 pédagogues de plusieurs pays, pratiquant les techniques FREINET se sont réunis à Rouen du 5 au 10 avril. On a mis l'accent au cours du Congrès, sur l'efficacité de l'espéranto, langue-pont utilisée par un nombre croissant d'écoles pour des échanges internationaux. Deux collègues espérantistes (portugais et polonais) étaient par ailleurs les hôtes officiels de cette réunion.*

L'ESPERANTO DANS LE COSMOS!

un satellite américain destiné à vivre "des millions d'années" emporte en effet dans ses flancs, entre autres messages destinés aux éventuels habitants du cosmos, un document émanant d'Australie et qui mentionne, en langue espéranto, la position géographique du continent sur le globe.

*L'ESPERANTO A LA TELEVISION ITALIENNE*

*Les chaînes de télévision collaborant à l'information ou à la diffusion de l'espéranto sont de plus en plus nombreuses. C'est ainsi que "Télé-Roma 56" a diffusé en un mois 5 programmes consacrés à la langue internationale. Un cours télévisé d'E° est envisagé pour l'automne prochain.*

NOUVEAUX SUCCES DU THEATRE ESPERANTO DE PARIS

Après sa participation au Congrès de SAT-Amikaro à Bédarieux, aux Congrès Fédéraux de Paris et de Bar-le-Duc -près de 300 personnes ont assisté à la soirée artistique dans cette dernière ville- le TESPA a obtenu un "prix spécial" au Concours Inter-Jeunes de Versailles où il présentait KORVO, oeuvre originale de Kisaku-Tabata, prix qui lui fut remis par l'Académicien Maurice RHEIMS.

*L'ESPERANTO ENTRE A SON TOUR A L'UNIVERSITE ESPAGNOLE*

*90 étudiants se sont inscrits au cours expérimental d'espéranto de CHESTE (Région de Valence) sous la direction du professeur Navaro. En fonction des résultats, de nouveaux cours pourraient être ouverts à la prochaine rentrée universitaire.*

DEUX NOUVELLES CHORALES ONT CHANTE EN ESPERANTO



Après la chorale des jeunes filles de Hastings (notre photo) qui a participé au 61ème Congrès Britannique en avril, les 80 garçons et filles du CES Theuriet de BAR-le-DUC, arborant l'étoile verte sur T-shirt jaune, ont à leur tour connu un vif succès au 36ème Congrès Fédéral d'E° de la région de l'Est de la France. Folklore ancien et moderne et l'hymne espérantiste étaient inscrits à leur répertoire.

# el nia federacia kongreso ★

— Estas malfacile raporti pri tiu-ĉi kongreso, ne ĉar ĝi ne estis kontentiga aŭ malbona, sed kontraŭe ĉar en la vico de niaj kongresoj ĝi estis unu el la plej elstaraj: gesamideanoj-organizantoj en BAR-le-DUC, bonvolu fermi la orelojn kaj la okulojn!

— Unue akceptis nin la urbodomo senpage pruntedonita al nia kongreso: multaj lokoj, allogaj, lumoplenaj, vere komfortaj. Notendas ke unu entenis preskaŭ kompletan ekspozicion pri Esperanto, ĝia historio kaj ĝiaj sukcesoj kaj ke alia ĉambrego ricevis ĉiujn kongresanojn por la prelego kaj la ĝenerala asembleo.

— Prelego pri R. SCHWARTZ. Valoras diri, ke S-ro HAUPENTHAL el la apuda kaj amika Sarlanda Asocio restis racia kaj emocia parolante pri sia majstra amiko. Ni ĝuis pro la bonega stilo, pro la ĝusta tono, pro la ekzakta kunsento inter la racio kaj la emocio. Jes, ĉiu laŭ sia speca spico!

— Kaj venis la vespero! Kia vespero! 80 kantistoj sur la scenejo. Kantoj, skeĉoj, poezi-deklamado, teatro... En la ĉambro pli ol 300 personoj por vidi, aŭdi, ridi, gustumi, aplaŭdi. Ĉar ĉi-vespere ni aŭdis bonan poeziaĵon, bonan muzikon, belajn voĉojn, belajn teatrerojn...

Ĉu mi povas aldoni
Sen aplaŭdon ordoni
Ke ĉiam meze de ni
Prizorgis ĉies-Denis?...

— Dimanĉe matene, post mallonga sed tamen ripoziga nokto, ni nin retrovis preskaŭ ĉiuj por partopreni en la jara ĝenerala asembleo. Oni multe diskutis post la aŭdado de la agad- kaj kasraportoj unuanime akceptitaj. Sed antaŭe oni renovigis la komitaton. Valoras substreki, ke de nun la porknaba komisiono konsistas el kvar personoj sub la gvidado de S-ro GREINER. Temas pri S-ro DEGUÎNES, S-ino HAUSER, S-ro DEGRELLE. Longan vivon kaj viglan agadon al la komisiono. Eniras la komitaton: S-ino HAUSER; S-ro DEGUÎNES, S-ro VANOLA. Deĵoras kiel kaskontrolisto: S-ro KUBLER.

— Oni devis paroli pri la statutŝanĝoj. Malfacila diskuto pro la malsimilaj opinioj. Tamen finfine la rezulto estis la jena: la nova statutaro estas akceptita; kelkaj etaj punktoj devos esti plibonigitaj. La ĉefa afero estas, ke, kiu ne deziras esti membro de UFE kaj UEA, povu esti membro de nia Federacio, tio por permesi al la plej granda nombro da samideanoj kunliĝiĝi, kunagadi kaj poste tiuj, kiuj deziras, aniĝos kaj al UFE kaj UEA. Ĉi-tie gravas aldoni, ke la klopodo de la tuta asocio kaj ties estraro estas instigi ĉiujn membrojn iĝi UFE- kaj UEA-membroj. Restas kelkaj malfacilaĵoj, sed la tempo kaj la ĉies-bonvolo glatigos la tuton.

— Poste okazis la akcepto far la urbo-konsilantaro. Nia prezidanto bone parolis, enŝovante en sian paroladon instigon, por ke unu strato de Bar-le-Duc ricevu la nomon "Zamenhof". La helpurbestro dankis, bondeziris, gratulis kaj amikiĝis. Kompreneble, Esperantistoj ni restas Francoj... la vino (ĉampana mi petas!) kronis la tuton kaj helpis al ankoraŭ pli bona etoso.

— Kion aldoni? Ke la manĝoj ĉe la restoracio estis laŭ la racio sufiĉaj, variaj, allogaj, bongustaj. Ke la vizitojn iom ĝenis malfavora pluvo. Ke ĉiuj prizorgantoj fidele deĵoris ĉiu sur sia tereno. Ke la etoso estis amika, eĉ frata. Ke oni rendevuis en STRASBOURG por la proksima jaro. Ke laŭ la kompleta listo - entenanta ĉiujn sekretariojn!- ni estis 65. Ke mi konservas bonan memoron pri tiu kongreso, esperante la samon por ĉiuj partoprenintoj.

Kaj nun la nova komitato:

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Prezidanto | : S-r° | COLNOT | (Laxou) | 2a Sekretariino | : F-in° | JACQUOT | (Epinal) |
| Vicprezidanto | : S-r° | LIENHARDT | (Mulhouse) | Redaktoro | : S-r° | DENIS | (B-le-D) |
| 1a Sekretario | : S-r° | DEGRELLE | (Nancy) | Kasisto | : S-r° | GROSSMANN | (Baldersheim) |

Membroj: D S-r° BERGEROT (Epinal), DEGUÎNES (La Bresse), S-r° GREINER (Ecrouves), S-in° HAUSER (Vandoeuvre), S-r° NAU (Metz), S-r° VANOLA (Bar-le-Duc), D-r° VOLTZ (Epinal), S-r° ZIPFEL (Strasbourg)... do 14 personoj.

raportis: Roger DEGRELLE

## Ekzamenoj ★

Dum la Orientfranca E°-Federacia Kongreso en BAR-le-DUC ni okazigis E°-ekzamenojn

En la unuagrada sukcesis:

*S-in° Camille DENIS kaj F-in° Isabelle DENIS, edzino kaj filino de nia sindonema samideano DENIS el BAR-le-DUC.*

*Ankaŭ F-in° Anne AMBLES el BAR-le-DUC kaj F-in° SPEICH Odile el COLMAR.*

Ni gratulas kaj deziras al ili pluan fruktodonan lernadon por grimpi la ŝtuparon de la E°-diplomoj!

F. ZIPFEL

# el nia decembra staĝo ★

47 staĝanoj ni estis. Sufiĉe multnombraj, ĉu ne? Kaj ankaŭ laboremaj. Ni multe legis, prononcis, respondis kaj ade! Ni eĉ manĝis kaj trinkis kompreneble. Alie, kiel labori, ĉefe dum dimanĉo, se oni nek manĝas nek trinkas. Kaj oni povas aserti, ke la manĝoj en la Junuldomo allogas kaj plaĉas. Do ĉi-flanke, tute en ordo!

Ĉu vi scias, ke kelkaj trapasis ekzamenojn? tiuj-ĉi ne nur lernis hejme kaj senĉese sed ankaŭ deziris scii, ĉu la ekzamenanto estas ne tro severa kaj la konoj sufiĉaj. Oni povas jese respondi al ambaŭ demandoj.

Vespere, iu vojaĝinta samideanino lumbilde kaj... parole rakontis pri sia vizito al Rusujo: vera plezuro kaj por la okuloj kaj por la oreloj. Dankon, sinjorino GRAMPP! Dankon ankaŭ al Dominiko, kiu plue spertigis nian, jam lacan, cerbon per amuza kaj lerniga ludo. Se iuj deziras koni tiun ludon, ili estas amike invititaj al la estonta staĝo.

Plie S-r° COLNOT parolis pri ZAMENHOF, dum la vespero al li dediĉita, kaj kantigis nin helpe de surbendigita muziko.

Kiel ĉiufoje la etoso ĉarmis, la amikeco sentiĝis kaj la infanoj... petolis, eble tro, sed infanoj estas kaj restas infanoj...

Esperante, ke ĉi-tiu raporteto incitos kelkajn pliajn al partopreno en futura staĝo, mi deziras, ke ĉiuj paŝu al plena posedo...

R. DEGRELLE

*La staĝo konsistis el 4 kursoj, gviditaj respektive de S-roj DEGUÎNES (A1), GREINER (A2), COLNOT((B), DEGRELLE (C).*

*La plej vizitata estis A2 kun ĉirkaŭ 20 gelernantoj. Ekzamenoj okazis dimanĉe, matene kaj posttagmeze (la kurso A1 tiam ne plu okazis)*

*Dimanĉe posttagmeze, invitataj de la SAT-rondo, ni ĉeestis tre interesan ekspozicion pri E° en la Popol-Universitato de NANCIO. Unuafoje en niaj staĝoj ĉeestis 4 personoj el METZ kaj THIONVILLE, kiuj eklernis Esperanton tute solaj per la metodo "ASSIMIL" 6 monatojn antaŭe kaj jam bonege parolis.*

<u>Jen opinioj de kelkaj staĝanoj:</u>

El Sr° DEGUÎNES Lucien (88 La Bresse) ___

... Mia ĉefa impreso koncerne la lastan staĝon estas sento de re- kaj pli-vigligo pri E°. Esti loĝinta dum 24 horoj en Esperantujo (eĉ se nur Esperantujeto!); esti pensinta kaj parolinta en E° eĉ se ofte mallerte; esti vivinta kune kun homoj ĉiuj vivigitaj de la sama idealo, eĉ se devenantaj el medioj plej diversaj: ĉio-tio igas min kredi, ke tiu idealo estas ne tiel utopia, kiel iuj foje opinias...

El S-r° GREINER Gérard (54 Ecrouves) ___

... pri la staĝo mi tre ŝatis la tre bonan etoson kaj ŝajnis al mi, ke la krokodilantoj estis malmultaj. Malfacila estis la kurso A2, ĉar la kon-niveloj estis tre diversaj malgraŭ la lern-deziro de ĉiuj.

El S-in° MULLER Marianne (Strasbourg) —

... mi multe ŝatis la staĝon en Nancy. Ni estas dankema al vi organizi tiajn staĝojn kaj trovi tiel bonajn instruistojn.

El S-in° OEHRI (Strasbourg) —

... o jes ja, tre plaĉis al mi via lasta staĝo! Ĝi estis plej bonega kaj mi esperas povi ĉeesti la sekvantajn.

*JP COLNOT*

## eĥoj el "Junkerwald" ★

La 9a Kultura Semajnfino de la Sarlanada Ligo okazis (kiel kutime nun) en la konferencejo "JUNKERWALD". La kastelon, kun ĝia parko super la lago, mi ne bezonas prezenti al jam multaj el niaj legantoj, kiuj iam ĉeestis tie.

Okazis kurso por komencantoj (en kiu ŝajne mankis komencantoj!) gvidite de Karl BURGER, tre vigla kurso por progresintoj, gvidite de Günther BECKER, kaj prelegserio de William AULD pri la temo "Enkonduko en la originalan literaturon de E°"

Ĉeestis entute... 4 Akademianoj: Prof. WARINGHIEN, S-roj Roger BERNARD, William AULD kaj Reinhard HAUPENTHAL.

La nivelo estis tre alta, la prelegoj ege interesaj, la preleganto perfekte interesis sian publikon.

La manĝoj estis tre bonaj, la vingustumado -kun 23 specoj da vino!- okazis feliĉe ĝuste antaŭ la enlitiĝo... ni nur bedaŭru ke malpli ol 40 personoj entute ĉeestis, ĉar tiel interesaj aranĝoj certe meritus allogi pli vastan publikon. La tuta prelego-serio de W. AULD estas registrita sur kasetoj. Oni povas pruntepreni ĝin; (kontraŭ repago de la sendkosto) ĉu al la adreso de SEL, ĉu al la adreso de la Orient-franca Federacio.

JP COLNOT

### ...el "La Hingrie" ★

*Amika ripoziga senprograma renkontiĝo okazis en LA HINGRIE (apud Ste-Marie-aux-Mines) la 21an de majo.*

*Malgraŭ manko de suno, ni ĝuis la belegan kaj trankvilan valeton kaj trapasis agrablan tagon. Ĉeestis ges. ZIPFEL, S-in° MULLER, S-in° GRAMPP, S-in° RUEFF, F-in° DIETZ, S-in° OEHRI, la tuta familio GROSSMANN kaj S-r° GUEGUENIAT (el St-Pierre-aux-Bois apud Villé) novbakita esperantisto, kiu eklernis E°n antaŭ 3 monatoj kaj unuafoje aŭdis kaj parolis ĝin.*

*(...laŭ letero de S-in° Oehri)*

## nia vivo en ... ★

NANCY - Parolaj kursoj

En MJC Philippe Desforges, ni anoncis 2 kursojn fine de oktobro, per 1600 folioj, 50 afiŝoj, 10 komunikoj en la gazetaro. Nur 5 personoj enskribiĝis entute, kaj ĝenerale ili ne povis ĉeesti regule. Ni funkcietis tiel ĝis la fino de decembro, provante konstante varbi pliajn interesatojn, sen sukceso. Ni ĉesigis la kurson, invitante la gelernantojn daŭrigi perkoresponde la lernadon.

Tria kurso, gvidata de S-r° DEGRELLE, funkcias ĉiumerkrede por 2 knaboj.

Du informkunvenoj okazis dum jznuaro, anoncitaj per 4 gazetkomunikoj kaj 50 afiŝoj por provi starigi novan vesperan kurson en MJC St-Epvre, en la malnova urbo NANCY. Nur 1 persono interesiĝis, kiu aliĝis al la perkoresponda kurso.

En VANDOEUVRE en MJC Etoile, S-r° KRAEMER gvidis duagradan kurson ĝis la fino de marto kun 2 lernantinoj. Tiam li transloĝiĝis al Guebwiller. S-in° HAUSER gvidas unuagradan kurson kun nur unu lernanto.

KUNVENOJ

Ni provis starigi kunvenojn komunajn por esperantistoj de Vandœuvre kaj Nancy. Nur unu kunveno okazis dum decembro kun 5 ĉeestantoj. Poste la kunvenoj ne plu povis okazi.

Ni anoncis kunvenon en MJC Philippe Desforges, la 30an de aprilo, al kiu estis invitataj ĉeestontoj anoj de la TESPA (Teatra Grupo de Parizo). 4 personoj ĉeestis, sed TESPA ne povis veni!

*ESPERANTO EN LA UNIVERSITATO E NANCY*

*S-in° Marie-Thérèse MAS, asistantino en la Scienca Fakultato de la Nancia Universitato, renkontis iam profesoron FRANK, el la Universitato PADERBORN. Li invitis ŝin prezenti dum sciencista seminario en Paderborn novembre, referaĵon pri siaj laboroj pri aŭtomata lingvo-traduko.*

*Ŝi havis eblecon elekti aŭ la germanan lingvon, kiun ŝi tute ne scipovas, aŭ Esperanton Ŝi elektis Esperanton! Ŝi kontaktis S-ron DEGRELLE (Delegito de UEA en NANCY) por ke li prizorgu tradukon de ŝia (tre malfacila!) teknika tasko. Ŝi eklernis sola kelkajn lecionojn, ni renkontiĝis plurfoje por kontroli ŝian lingvo-kapablon. Ŝi mirinde bone legas E°-tekston kaj ŝia prelego en PADERBORN estis sukcesa. Poste ŝi prelegis denove en HANOVRO dum sciencista seminario, dum marto. Ŝi partoprenos alian seminarion en Jugoslavio dum junio. Ŝi daŭre lernas por plej baldaŭ scipovi vigle diskuti en E°.*

*La regiona gazeto "L'EST REPUBLICAIN" dediĉis dum aprilo artikolon al tiuj sciencaj esploroj pri aŭtomata lingvo-traduko kaj samtempe pri esperanto kiel helplingvo.*

PERKORESPONDA KURSO

*unuagrada:* ĝis la fino de decembro ni dissendis al la regiona gazetaro 30 komunikojn por informado pri tiu kurso. Ni povis kontroli la aperon de nur 13 komunikoj, ni ricevis 48 informpetojn kaj 11 personoj aliĝis al la kurso. Pro tio ni estis sufiĉe pesimistaj pri la sukceso de nia kurso en la nuna lernjaro.

Sed subite, komence de januaro, novaj komunikoj aperis samtempe en 6 diversaj gazetoj, la radio ankaŭ anoncis ĝin. En unu semajno alvenis preskaŭ 100 leteroj! Aktuale, komence de juinio ni dissendis entute 73 komunikojn el kiuj 41 aperis laŭ nia kontrolo, alvenis 174 informpetoj, 55 gelernantoj aliĝis al la kurso.

*ĝisnunaj rezultoj:*

Dum la lastaj monatoj finlernis nian kurson 7 lernantoj:

S-r° Roland GIRARD-CLAUDON (25200 MONTBELIARD) kaj S-r° Edmond LUDWIG (68140 STOSS WIHR) ambaŭ gviditaj de S-r° ETIENNE (54 MALZEVILLE). S-r° ANDRIEN gvidita de S-r° DENIS (ambaŭ en BAR-le-DUC). S-r° Antoine LUCZAK (57450 FARSCHWILLER) gvidita de S-r° GREINER (54 ECROUVES). S-r° Jean-Claude GUELEN (68470 FELLERING-WESSERLING) kaj S-r° Yves GUEGUENIAT (67220 SAINT-PIERRE-AUX-BOIS) ambaŭ gviditaj de S-r° LIENHARDT el Mulhouse. S-r° Xavier SPRAUER (67310 IRMSTETT) gvidita de S-r° ZIPFEL (STRASBOURG)

*duagrada:* Al nia kurso aliĝis 5 novaj gelernanatoj de post oktobro. Ĉar la lernado de tiu kurso estas tre longa (50 lecionoj!) 15 personoj nun laboras en tiu kurso kiu trejnas niajn estontajn aktivulojn.

J.P. COLNOT

TOUL La lernantoj pli malpli regule aboras per la libro "por la praktikantoj". lernantino provis varbi por la perkoresponda kurso.

G. GREINER

LA BRESSE En la lernejo, kie mi instruas, mi povis starigi E°-kurson. Ni -pli malpli dekope- kunvenas dufoje en la semajno dum 20 minutoj post la tagmanĝo, kaj laboras per la metodo Ferez. Ni ne skribas sed nur legas, el- kaj de-tradukas parolante. Ĉar mi ne volas, ke la geknaboj havu la impreson lerneje esti, mia farmaniero ne estas pedagogie tre ortodoksa.. Mi devus neniam miksi la nacilingvon de la lernantoj kaj lingvon lernatan de ili. Sed ne tre gravas... se mi sukcesos interesi ilin kaj ĉefe ilin obstinigi. Ĉar tiu kurso okazas ene de la lernejo, ni anoncis ĝian malfermon al la Akademia Inspektoro kiel "gvidatan agadon".

L. DEGUINES

METZ Ni havis nian unuan parolan kunvenon la 4an de februaro en *CENTRE CULTUREL MARC SANGNIER en MONTIGNY-lès-METZ.* Ni estis 7 partoprenintoj. Ni kontaktis diversajn personojn kaj inter ili personojn kiuj petis informojn pri la paerkoresponda kurso. Ni aranĝis afiŝojn kaj resumon de la cirkulero pri la perkoresponda kurso.

S-in° NAU

THIONVILLE Kunvenoj organizitaj de S-r° LINDAU okazas la 2-an kaj 4-an merkredon de ĉiu monato en la Kulturdomo, kies Direktoro estas favora. Dum marto 7 personoj ĉeestis, inter ili S-in° Nourmont-Moom, prezidantino de TEJO kaj eks-ĝenerala sekretariino de UFE, kiu nun loĝas en Luksemburgio, instruante en la liceo de Thionville.. kie ŝi informadas pri esperanto

SELESTAT Lerninte Esperanton perkoresponde dum 3 1/2 monatoj, S-r° Yves GUEGUENIAT, agregacia instruisto pri beletro) ĵus ekinstruis E°n al siaj gelernantoj (en la kadro de la "10% libera tempo por libera aktiveco"). Krome gejunuloj petis lin starigi kurson en la loka Junuldomo. Unua kunveno okazis la 1an de junio... Bondezirojn al nia nova aktivulo, kiu mem nomas sin "la Selestata lokomotivo!"

BAR-le-DUC Ĵus finis la 3a-grada kurso, kiu fidele kunvenigis ĉiusemajne de 5 al 7 gelernintojn. 2 el ili intencas trapasi la ekzamenon "atesto pri praktika lernado" okaze de la junia staĝo en NANCY. Cetere 4 membroj de la grupo flugvojaĝos al REYKJAVIK. Post la Federacia Kongreso, pri kiu estas aliloke raportite, la organizintoj ricevis "komplimentojn" el diversaj partoprenintoj. Ni aparte menciu la komunikon de TESPA: ..."*Ni admiris la bonan organizon de la kongreso kaj la afabla akcepto de la enloĝantoj. TESPA estis gastigata kiel nobela kortego. La teatra-salono estis tre bone ekipita kaj sufiĉe kvalita. Ni ĝojus ĉiam ludi en tiaj londiĉoj.*"

## NEKROLOGO

Sinjorino Germaine DEGRELLE - La 19an de marto forpasis S-in° DEGRELLE, patrino de nia sekretario Roger DEGRELLE. Ŝi estis 78-jara. Post sia filo, ankaŭ ŝi eklernis E-°n per nia perkoresponda kurso, antaŭ preskaŭ 20 jaroj. Ŝi estis membrino de nia Federacio ĝis la pasinta jaro.

Al Roger DEGRELLE kaj al lia tuta familio ni tre sincere kondolencas.

Sinjorino MARCHAL - La 17an de aprilo mortis S-in° MARCHAL, 101-jara, patrino de nia samideanino Andrée MARCHAL (kiu ofte gvidas parolajn kursojn en NANCY). Al Andrée MARCHAL kaj al ŝia familio ni prezentas nian tutan simpation.

J. P. COLNOT

**Partoprenu baldaŭ !...** ★

*el SARLANDA ESPERANTO-LIGO* - *Nia 10a KSF okazos de 30 sept.-2 okt. 1977 denove en la konferencejo JUNKERWALD.*

*La programo konsistos el 3 diversnivelaj kursoj (komencantoj - konversacia kurso sub gvido de Olivier TZAUT (Svislando) - prelegserio de Uwe Joachim Moritz pri la temo "Etnaj minoritatoj en Eŭropo".)*

*Krome okazos nia tradicia aŭtuna tombolo, katolika diservo, promenado, ktp.*
*Por pliaj informoj sin turni al* SEL-Franz-Schubert-Str. 26 D-6602 DUDWEILER

*SOGELO - TAGO 1977* - *8an/9an de oktobro 1977*
*Sudokcidenta Germana Esperanto-Ligo kaj E°-Grupo OBERKIRCH tre kore invitas al semajnfina renkontiĝo en belega pejzaĝo.*

*El la varia programo elstaras, krom la distra vespero, du prelegoj (Verkaro de SCHWARTZ far R.HAUPENTHAL, kaj "E-° kaj filatelio" far HEI )*

*Pliajn informojn kaj aliĝilojn sendos* E°-Grupo OBERKIRCH, Lohmühlweg 1, D-7602 OBERKIRCH

DISKONIGU ESPERANTON.... per vizitkartoj! ★

UFE ĵus eldonis vizitkartojn por koncize prezenti E°n. En epoko, kiam la homoj ne plu havas tempon legi longajn tekstojn, la ideo aspektas originala kaj interesinda. Krom kelkajn informojn pri la lingvo la karto indi as la adreso de UFE kaj blanka spaco povas ricevi vian stampilon.

Vi povas mendi tiujn kartojn rekte al UFE, aŭ al nia nia Federacia Kasisto *André GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.*

*La prezo estas po 0,20 F + sendkostoj 20% (minimuma mendo : 10 kartoj)*

connaissez vous l' **ESPERANTO**
la langue internationale

C'est la plus facile de toutes les langues, créée en 1887 par le Docteur Zamenhof, médecin polonais, actuellement parlée dans plus de 80 pays par des centaines de milliers d'hommes.

Etudier l'Espéranto, c'est contribuer à vaincre les barrières linguistiques qui divisent notre monde d'aujourd'hui.

Estas la plej facila el ĉiuj lingvoj, kreita en 1887 de la Doktoro Zamenhof, pola kuracisto, nun parolata en pli ol 80 landoj de centoj da miloj da homoj.

Per studado de Esperanto, oni kontribuu al venko super la lingvaj baroj disigantaj nian hodiaŭan mondon.

Des dizaines de milliers d'oeuvres existent en Espéranto, tant originales que traduites, littéraires que scientifiques, ... et vous trouverez aisément dans le commerce :
l'Espéranto sans peine (méthode Assimil), par Jean Thierry
l'Espéranto (collection Que Sais Je ?), par Pierre Janton



Kaj tuj ni, kara mia, per Esperanto faru "unu grandan rondon familian!"

*En aliaj okazoj vi tutsame povas uzi la poŝtkarton, kiun PEYNET speciale desegnis por diskonigi E-°n...*

*La poŝtkartoj estas akireblaj po 2 F (100 po 1,50F)*

*Mendu de S-r° Jean THIERRY*
*5 rue Léon Cogniet*
*75017 P A R I S*

*Imprimé par les soins du Secrétariat des Associations, 12 rue Voltaire, 55000 BAR-LE-DUC*
*Le rédacteur : Pol DENIS*
*Le Directeur de la publication : Jean-Paul COLNOT - Dépôt légal n° 245*